## Vi lernos, kaj praktikos

ITA(J)(N)
Participoj -- Pasivaj -- Adjektivaj

## Ekzemploj:

La pordo estas fermita. (nun, ĉar oni fermis ĝin.)
La fenestroj estas malfermitaj. (nun, ĉar estas tre malvarme ekstere.)
La glasoj estas rompitaj. (nun, ĉar ili falis sur la plankon.)
Tiu glaso ne estas rompita. (do, ni povas trinki el ĝi.)

Unue ni lernos kaj praktikos participojn kiuj indikas nunajn rezultojn. Bonvolu rigardi la sekvantajn ekzemplojn.

La knabo kiu ludis kun la pilko **rompis** la fenestron.
⇒ Do nun la fenestro estas **rompita**, kaj oni devas ripari ĝin.

Hodiaŭ la sekretariino **tajpis** dek leterojn per komputilo.
⇒ Do nun dek leteroj estas **tajpitaj** kaj pretaj por sendi.

La dornoj de la rozujo **ŝiris** lian pantalonon.
⇒ Do nun lia pantalono estas **ŝirita**, kaj iu devas kudri ĝin.

Li ĵus **lavis** la manĝilaron.
⇒ Do nun la manĝilaro estas **lavita**. La forkoj, tranĉiloj ktp estas puraj.

En BEKKVAR, la lasta parto de la BEKKURSO, vi profunde studas multajn aliajn participojn. Krome, vi vidos la rilaton inter tiuj participoj kaj ĉio kion ni studis en BEKTRI kaj BEKDU.